



| ENHAVTABELO | PAĜOJ |
|---|---|
| Se vi ŝatas librojn, kiuj priskribas imagan mondon, la libro, kiun ni elektis por tiu somero certe plaĉos al vi. Por pli da detaloj, legu la recenzon ĉi apude. | 1 2 3 |
| Post la dua mondmilito la loko okupata de la virinoj en ĉiuj kampoj daŭre pli kaj pli grandiĝis. Sed ĉu nia socio iĝos iam tia, kia prikribas ĝin la verkisto de la novelo permesatesto ? | 3 4 5 6 |
| Dum la malfermoceremonio de la Olimpiaj ludoj en Parizo en 2024, oni honorigis Jeanne Barret, al kiu ni dediĉis artikolon. | 6 |
| Kvankam ili jam intervenis en Nepalo pro tertremoj, Kuracistoj de la Mondo helpas hodiaŭ al la rubaĵkolektantoj. Legu tiun artikolon dediĉitan al tiuj nekonataj laboristoj. | 7 8 |


# Rela Kulturo * Libro *

## Noveloj. **La ukronikaj kronikoj de Laurent Genefort**

*Per « La blua marvojaĝo », Laurent Genefort enprofundigas nin en sian ukronikan mondon, kie la homaro liberiĝis el la gravito dank' al la « kavorito ». Sed ĉifoje la imaga materialo elpensita de H. G. Wells en lia romano « Unuaj homoj sur la luno » ne plu estas sinonima je eterna progreso.*

*« La alveno sentiĝis pro pezecofluktuoj, kiam la pasaĝerŝipo direktis siajn plumbitajn klapojn por malpliigi la altecon. Ĝi akompanis la trakŝanĝojn de la lokomotivo ĝis la alveno en la stacidomon : giganta novklasikisma konstruaĵo, kiu povintus esti rigardata kiel la Vincennes stacidomo. Ĉiu urbo deziranta akcepti transkontinentan ŝipon devis disponi elŝipiĝejon kaj ŝipanaron direktatan de aprobita alfostkajiĝestro. Parizo rezervis al si la Ejfel turojn, tiel ke Varsovio kontentiĝis je granda turo kun ebena supro, kiu portis la nomon belvedero. »*

La ĉi-tie priskribitaj transportrimedoj komence de la 20a jarcento estas tiuj elirintaj el la imago de verkisto. Post sia romano « La ultramodernaj tempoj » publikigita en 2022, Laurent Genefort revenas en la eraon de la kavorito. Kavorito ebligas ĉiujn heroaĵojn . Ĝi ebligas eskapi el la fizikaj leĝoj, ĉar la plej pezaj ŝarĝoj liberiĝas el la gravito. Ĉio povas iĝi fluganta

objekto : domo, veturilo, tramo… kaj eĉ pasaĝerŝipo. La grandaj transatlantikaj ŝipoj trasulkas la mondajn marojn, kaj alveninte al la firma grundo, ilin remorkas vaporlokomotivoj, kiuj ebligas al ili traveturi la kontinentojn. Laurent Genefort proponas en « La blua marvojaĝo » kvin novelojn kaj plurajn mallongajn tekstojn, kiuj ofertas al la legantoj kompletan panoramon de tiu mondo, « kavorizita » duoblaĵo de nia propra historio.




Ni estas en 1923. La nacioj kaj imperioj konkurencas rekte unu kun la aliaj por trovi kaj ekspluati novajn tavolojn da kavorito. Marie Curie malkovris, ke tiu erco havas limigitan vivdaŭron. La okcidentaj imperioj batalas por posedi la lastajn gangojn el kavorito. La lukto anonciĝas senkompate.

La ago okazas sur la Agénor, luksa transkontinenta « kavorizita » pasaĝerŝipo liganta Eŭropon kun Ekstrema Oriento.

En kajuto, pasaĝero, Lordo Cunighame, civitano de ŝia Majesto, murdiĝis. Gaspard, agento de la Dua Franca Buroo, devas malkovri tion, kio kaŝiĝas malantaŭ tiu apriore neklarigebla murdo. Li baldaŭ malkovras, ke la viktimo estas angla spiono kaj la potencoj malantaŭ tiu murdo povus rekte ataki la transatlanttikan pasaĝerŝipon kaj ĵeti la mondon en malfermitan militon.

Tiu fluganta mikrokosmo estas nesto de spionoj kaj Gaspard devas malfidi ĉiujn. Lia enketo igas lin renkonti la mekanikiston kaj la hejtiston de la lokomotivo komisiita treni la Agénor tra Eŭropo kaj Azio : *« Atendante la revenon de la vizitgrupo, li eniris la stacidomon kaj aparte parolis al la trajnestro. Li fiere portis kaskedon ĉirkaŭpremitan de la rimeno de kondukadookulvitroj tiel makulitaj kiel lia laborvesto. Li estis Transalpano, kies persona nomo estis Aldo. Lia perfekta franca lingvo datumis de la formado, kiun li vizitadis en la Lyon stacidomo. La unua Belvedero estis tie konstruita antaŭ la konstruado de la parizaj Eiffel-Toussaint turoj utilaj kiel registrohavenoj de la kavorigitaj pasaĝerŝipoj. »*

En unu el la noveloj, *« 50 hektaroj sur Marso »*, ektraktiĝas la koloniado de la suna sistemo, ebligita de la kavorito. Eniĝante en trajnon al Parizo, Germain komencas longan vojaĝon al la ruĝa planedo, kie atendas lin liaj 50 hektaroj da tereno,. Ekde la ĉefurbo, spaca pasaĝerŝipo devas konduki lin trans la teran orbiton.

La novelo *« En la ĉasado de la Antikavoriumo »* prezentas la batalon de sciencistoj por savi la teron de la apokalipso.

Inter ĉiu novelo, Laurent Genefort kreis gazetaran artikolon esprimantan la ideojn de la epoko. *La Dépêche de Paris*, *Le Journal*, *Le Figaro*, *L'Ouest-Eclair aŭ ankoraŭ L'Intransigeant*, la tuta gazetaro sekvas la aktualaĵojn pri la kavorito.

Laurent Genefort estas la verkisto de ĉirkaŭ kvindek romanoj. Li ankaŭ uzas sian imagon por servi al la videoludo, la aŭdovidaĵo kaj la bildstrio kiel scenaristo. Kvarfoje laŭreato de La Grand Premio de la Imagaĵo, li sukcesas per La blua marvojaĝo transporti nin en tiun paralelan realon,

en kredeblan rakonton, kie ĉio kaj ĉiuj povas flugi.
Fine de la verko li proponas en kromdokumento kompendion de Kavorologio, kie la historio, la grandaj principoj kaj la realigaĵoj de la kavorito estas detalitaj. Grava precizeco : *« tiu libreto ricevis la aprobon de la ministerio pri la nacia edukado kaj de la regiona administracio, kies laboro estas popularigi temon konatan de ĉiuj : la kavorito. Pli konciza ol traktato, ĝi reprezentos valoran helpilon por la instruistaro kaj la instuticioj, sed ankaŭ por la familiestroj zorgemaj pri la edukado de sia idaro. »*

*Tiun recenzon de Samuel Delziani aperinta en La Vie du Rail de la 31a de majo 2024 esperantigis Jean-Mary Simonet.*




***La blua marvojaĝo de Laurent Genefort. Albin Michel Imaginaire. (2024) Prezo : 21,90€.***

# La Permesatesto de Stéphane Livino

2an de aprilo 2076. Post akraj kaj senfinaj debatoj, la Nacia Asembleo ĵus aprobis la starigon de patreca permesatesto. Laŭ la modelo de la konduklicenco, ĉiu viro devos ekde nun je sia plenaĝeco atesti, ke li kapablas iĝi patro kaj porti sian respondecon de parenco kun la tutaj necesaj persona engaĝiĝo kaj juĝkapablo. La antaŭparolo de la leĝo ebligas nenian dubon pri ties celeco : « La ĝis nun necedebla rajto iĝi patro estas abolita hodiaŭ de la Nacia Asembleo, reprezentanta la francan popolon ». Vasta investplano de du miliardoj da bitmonoj (bitcoins : sola elektronika valuto nun virtuale cirkulanta en la socio) estas antaŭvidita por realigi la dispozicion. Ĝi celos instali la strukturojn por la formado kaj taksado, la administracion ŝarĝitan de la livero de permesatestoj, kaj la steriligejojn.




**Bourbon Palaco, sidejo de la Nacia Asembleo**

Jennifer Toldo, 72-jara, ĵus legis tiun artikolon sur la likimuna tabulkomputilo, kiun ŝi regule konsultas sin banante post sia matena sankurado. Tiu infanpsikiatriino, kun bone instalita reputacio, dronas en la emocio. Post tiel longa vojo semita per obstakloj, ŝi fine atingas la celon, kiun ŝi pensis neatingebla antaŭ siaj 75 jaroj, laŭleĝa aĝo por ŝia emeretiĝo el la publika hospitala servo. Feminisma aktivulino, ŝia engaĝiĝo datumas de ŝiaj jaroj de liceanino, kiam la fenomeno de incitado kaj seksaj agresoj de viroj kontraŭ virinoj

malkaŝiĝis taglume. En la funda fundo de sia memoro ŝi duonvidas la porkan vizaĝon de la holivuda produktisto, kies multaj abomenindaj agmanieroj estis estintaj la eksplodigilo de monde komentita skandalo. Ŝi partoprenis tiun batalon kaj ankaŭ ĉiujn tiujn, per kiuj estis prisemota tiu jarcento, decida senigi la socion je la patriarka modelo kaj la vira hegemonio laŭ ŝi nepravigita kaj malbona.
En tiu paca milito, kiun ŝi plene faris dum jardekoj, la plej grava batalo estis laŭ ŝi lukti kontraŭ la eksplodo de la monogepatreco, kiun ŝi nomis la socia kancero de la XXIa jarcento. En la multaj konferencoj, kiujn ŝi faris pri tiu temo, Jennifer komencis siajn paroladojn liverante al la publiko tiun nerefuteblan konstaton : 9 % el la familioj estis monogepatraj en la 1970-aj jaroj, 24 % komence de la 2010-aj jaroj, 38 % fine de la 2040-aj jaroj, kaj sur la vertiĝa kulmino de la kurbo videbla sur la giganta ekrano malantaŭ ŝi, 51 % en 2070 ! Sen surprizo patrinoj estis plej ofte tiuj, kiuj suferis pro tiu maljustaĵo kaj edukis solaj siajn infanojn.

D-ro Toldo konstatis pli ol iu ajn la kolaterajn domaĝojn de tiu « malsano », kiu malfortigis siajn viktimojn. Specialiĝinta pri la perturboj de la adoleskanteco, kiom da junuloj kaj junulinoj devenintaj el tiuj familioj ŝi estis vidinta pasi en sia konsultejo ?
Perturboj de la personeco, sinmalestimo, kronika angoro, diversaj foboj estis la malbonoj, kiuj plej ofte trafis tiujn junajn plenkreskulojn en tiu tiel decidiga tempo de la konstruo de ilia identeco. Tiuj estuloj fendetitaj ekde la disiĝo de iliaj gepatroj portis sian propran suferon kaj tiun de sian forlasitan patrinon, sola fronte al la problemoj de prema ĉiutagaĵo. La plimulto el ili eltenis la mez kvalitecon de la rilato kun sia patro, forlasanta la edukadon, kaj, ankoraŭ multe pli grava, sen korinklino al ili. Iuj sukcesis eviti la detruiĝon sed aliaj dronis en kronikan depriman staton, pro kiu ili suferis la tutan vivon.

La amasdisvastiĝo de la monogepatreca fenomeno kaj de la suferoj, kiujn ĝi generas al la infanoj, iĝis laŭ Jennifer decidiga punkto por la postvivo de nia socio. Ŝi konkludis siajn publikajn prezentadojn per tiu tranĉa aforismo : «  la malfeliĉo de unuj povas nur naski la malfeliĉon de la aliaj ». Ĉiuj tiuj infanoj en afekcia senheredanteco kaj en psikologia angorego devis esti akompanataj por eviti endanĝerigi sin, sed ankaŭ, kaj pri tio insistis Jennifer, por ke ili ne reĵetu sur la socion la respondecon de la suferoj, kiuj ronĝas ilin.

Progresante en sia volo trovi la antidoton kontraŭ tiu malrapida veneno, la d-rino Toldo proponis drastajn solvojn. Ĉiuj preventaj programoj starigitaj de ĉirkaŭ tridek jaroj malsukcesis. Por venki la monogepatrecan plagon ŝokterapio devis aplikiĝi. Patroj, grandkvante respondecaj pri tiu situacio, estos la celpersonoj. Dank' al regulaj aperoj sur televidplatformoj, kie ŝi brilis per la klareco de siaj raportoj, kaj asidua ĉeesto en sociaj retoj, la sociologia diagnozo, kiun ŝi starigis kaj la eblaj solvoj, kiujn ŝi skizis, vaste disvastiĝis en la publkan opinion allogitan de la potenco de ŝiaj konvinkoj.

Surmetinte sian banmantelon, Jennifer preparas al si tizanon enhavantan ginsengon kaj iras komforte sidiĝi sur la kanapon de la salono, fronte al sia larĝega ekrano, kie estas projekciata mozaiko de televidkanaloj. Nur celdirektante sian montrofingron, ŝi aperigas la kanalon pri seninterrompa informo, kiu diskonigas kaj komentas la aktualaĵon de la Nacia Asembleo.

Ekde la surpriza elekto de Allison Croman ĉe la prezidenteco de la VIIa respubliko, Jennifer havis bonan esperon, ke ŝiaj ideoj, alprenitaj dum la kampanjo de la kandidatino nun elektita, rapide stafetiĝu de la nova registaro konsistanta el 13 virinoj kaj 3 viroj. Tri semajnojn post la venko je la deputita elektado facile gajnita de la movo de Croman, leĝoprojekton proponis la ministrino pri sociaj aferoj. La Nacia Asembleo, kiu nun entenis 375 virinojn kaj 82 virojn tre favore akceptis tiun tekston. La viroj protestis kaj redaktis multajn amendojn sed ilia kuraĝa kontesto estis senrezulta. La teksto adoptiĝis per 373 voĉoj por, 80 kontraŭ kaj 4 sindetenoj. La freneza espero, kiun metis Jennifer en la sesa virino elektita estro de la lando, estis grandega. La leĝo, kiu estis ĵus votita eĉ transpasis tion, kion ŝi povis atendi.

Jennifer legas la ĉefajn artikolojn, kiuj alprenas la plejgravaĵon el ŝiaj proponoj ;

« Artikolo 1 –
Je sia plenaĝeco ĉiu viro devos vizitadi dum unu monato lernejon cele al testoj pri sia kapableco sin ekzerci al la gepatreco. Li sekvos tie instruparton necesan por la akiro de nemalhaveblaj kompetentecoj en la praktiko de la patra rolo. Paralele skipoj da psikiatroj starigos individuan diagnozon raportantan la intrinsekajn kapablojn de la ulo por plenumi tian funkcion. La vivvojo de la individuo estos rekonstruita dank' al la spureblaj

elementoj provizitaj de la datumbazoj de la ŝtato.
[…]
Artikolo 4 –
Suverena komisiono decidos pri la liverado de la gepatreca permesatesto, kiu prenos en kalkulon la rezultojn de la testoj pri la kapableco kaj la opinion de la ekspertoj pri psikiatrio. Kaze de neliverado, la individuo estas registrota en nacian dosieron nomitan « Nopater ». Li povos tamen, se li deziras, fari duan provon por obteni sian permesateston dum sia 21a jaro. Kaze de nova  malsukceso estas proponota al li steriligo per vazektomio. Kompense la individuo estas forstrekota el la supre menciita dosiero kaj tiel medicine rezignos la patrecan praktikon.
Artikolo 5 – En iuj kazoj difinitaj de la leĝofaranto, la suverena komisiono povos decidi devigon de steriligo per vazektomio, ĉar la risko, kiun prezentas la individuo kaze de naskigo, estas juĝita tro alta.
Artikolo 6 -
La nacia dosiero estos alirebla de la virinoj, kiuj projektas havi seksajn rilatojn kun viroj cele al naskigo. Programo de atentigo pri la uzo de tiu dosiero estas ekfunkciigota en la kolegioj, por ke ĉiu virino povu regi ties riskojn antaŭ la fino de siaj devigaj lernojaroj.
[…]
Artikolo 8 -
Virino povos libere elekti naskigi kun viro ne posedanta la patrecan permesateston. Tamen, kaze de foriro de la patro el la familia hejmo, la patrino estas metota sub ŝtata kuratoreco kaj steriligo per ovariektomio estas trudota al ŝi.
[...] »




La infanpsikiatriino ĝojegas vidi en kia grado ŝiaj ideologiaj principoj influegis la novan registraron. Postkiam ŝi injektis al si sub la okulojn sian ĉiusemajnan dozon da botokso, Jennifer pretigas sin forlasi sian apartamenton por iri al la hospitalo, kie ŝi disvolvas sian tutan talenton de preskaŭ tridek jaroj. Al ŝi restas nur pagi per sia kompufono la seksan servon de Léo445, ankoraŭ kuŝanta nuda sur la trapezoida lito lokita meze de la salono.
Nun jam de 20 jaroj  estas permesita la uberizado de la vira prostituado. Ankoraŭ batalo, en kiu Jennifer, nesubmetebla feministo, klopodis sen limo per korpo kaj animo por lukti kontraŭ la seksa mizero de la vidvinoj aŭ fraŭlinoj. Virinoj inter 60 kaj 80 jaroj uzas tion pli kaj pli en tute laŭleĝa kaj travidebla maniero. Viroj, kiuj nun plej ofte okupas la necertaj laboroj kaj kies enspezardiferenco kun virinoj ege altiĝis ekde la alveno de la nova matriarka modelo en la 2050aj jaroj, liveras tiun seksan servon kontraŭ kelkaj bitmonoj (la tarifojn de la seksaj agoj reglamentas la ŝtato). Postkiam ŝi validigis sian pagon, Jennifer ne forgesas elektronike registri sian opinion pri Léo445, kiun ŝi preferis al Jul684, ĉefe pro liaj glutea firmeco kaj mentola buŝodoro.



Tagfino. Kiel ĉiun lundon post siaj multaj kaj lacegaj konsultoj D-ino Toldo estas plenumonta neŝanĝeblan riton : ŝi iras al la tombejo, kie kuŝas ŝiaj patrino kaj frato. Tiu loko, kiu estas tiel familia al ŝi, situas du metrostaciojn for de ŝia loĝejo kaj ŝia vizito necesigas nur mallongan ĉirkaŭiron. Ŝi puŝas la pezan enirkradon kaj direktas sin kun fermitaj okuloj al la familia tombokelo.

Ŝia patrino forpasis 20 jarojn antaŭe, elĉerpita de vivo premegita de duobla mafeliĉo : tiu esti forlasita de la viro de sia vivo, patro de siaj du infanoj adoleskantoj, kaj tiu

esti perdinta sian filon kelkajn jarojn poste. Jennifer repensas pri tiu frato mortigita de la heroino je la dudeka jaro : iĝinta dependa, li fine inokuliĝis mortigan dozon de la opieca veneno por definitive forgesi la fuĝon de sia patra heroo.

Pli bonŝanca estis la infanpsikiatriino, ŝi ne pagis la koston kaj konsideras sin kiel rezilienculino, kiu venkis maljustecon. Enpensiĝante antaŭ la tomboŝtono el fuksikolora marmoro, ŝi interne persvadas sin, ke ŝi evitis eĉ alian rifon, tiun nutri spiriton de revenĝemo, kiu povintus fari ŝin individuo prezentanta riskojn por la socio. *Novelo esperantigita de Jean-Mary Simonet*

# Jeanne Barret, pionirino de la biodiverseco

**Kial la botanikistino Jeanne Barret estis honorigita okaze de la malfermoceremonio de Olimpiaj Ludoj en Parizo en 2024 ?**

**Necesis atendi tiujn Olimpiajn Ludojn por malkovri la ekziston de Jeanne Barret ! Pionirino, esploristina kaj pasia pri botaniko, ne gloru ŝin nur la 8an de marto, tago de la virinaj rajtoj.**

Jeanne Barret naskiĝis en 1740. En 1764, ŝi estas dungita kiel mastrumistino de Philibert Commerson, naturesploristo, kiu studas la flaŭron, la faŭnon kaj la etnologion. Interesegata de liaj laboroj, ŝi iafoje helpas lin por klasifiki liajn skribaĵojn kaj desegnojn. Jeanne tiam iĝas por la botanikisto pli ol dungistino : valora helpantino. En 1767, Commerson enŝipiĝas en Rochefort por vojaĝo ĉirkaŭ la mondo. Senespera pri la ideo esti for de tiu ĉi, kiun ŝi respektegas, Jeanne tiam alprenas nekredeblan decidon : sin maskovesti en viron por spiti la malpermeson por la virinoj esti maristo. Tiamaniere maskovestita, ŝi sukcesas enŝipiĝi en la fregato. Post iom da tempo, ŝia artifiko estas malkovrita kaj Jeanne estas arestita. La skandalo estas enorma. Kontraŭe al ĉiuj validaj reguloj, ŝi ne estas elŝipigita. Jeanne povas daŭrigi sian periplon kaj eĉ profiti de la protekto de Louis-Antoine de Bougainville, la estro de la ekspedicio.




Philibert Commerson forpasas en 1773. Jeanne estas speciale kortuŝita. Reveninte Francion, ŝi instaliĝas en Perigordo. La unuan de Januaro 1785, Ludoviko la XVIa atribuas al ŝi pension de 200 pundoj por ŝiaj talentoj de botanikisto kaj kvalifikas ŝin « eksterordinara ». Kaj prave, ĉar ŝi verŝajne malkovris proksimume 5000 vegetalojn, el kiuj la bugenvilon, grimpoplanto tiel alnomata honore al la fama marveturanto. Estas certe, ke ŝi estis unu el la unuaj botanikistoj, kiu parolis pri biodiverseco.

*Artikolo eltirita de la revuo NOTRE TEMPS Marto 2025 kaj esperantigita de Jeannine Layseman*



# NEPALO : RUBAĴOJ KUN GRAVAJ RISKOJ

Ĉeestanta en Nepalo ekde 30 jaroj, ĉefe per urĝecaj respondoj por subteni popolon regule trafitan de fortegaj tertremoj, Kuracistoj de la Mondo intervenas ĉe komunumo, kies laboro rekte minacas la sanon : la kolektantoj de rubaĵoj.

Bruo estas surdiga, odoro neeltenebla. Frumatene , jam la suno brulas sur la valo de Katmanduo, desegnante ombron de centoj da siluetoj, kiuj hastas sur la montarojn da rubaĵoj de la rubejo. Meze de impresa baleto de buldozoj kaj aliaj kamionoj venintaj por ŝuti la rubaĵojn de la ĉefurbo, kolektantoj de forĵetaĵoj, absorbitaj de siaj taskoj prenas ĉiujn riskojn por  selekti kiel eble plej rapide, rekuperante en tiu momento kelkajn produktojn, kiujn ili povus revendi por certigi  enspezon. *« Ĉi tie ĉiuj timas akcidenton, sed aliaj danĝeroj estas nombraj ,  kiel submeto al toksaj aŭ tranĉaj produktoj »*, klarigas Jano Dangol, delegito de la asocio de kolektantoj Sasaja.

## « Malalta kasto »

En Nepalo, sistemo de traktado de rubaĵoj estas kompleksa kaj tiu agado misfamigita de la popolo. Gi baziĝas sur la engaĝiĝo de la plej malsolidaj, ĉu devenintaj de la hinda enmigrado, ĉu membroj de alnomataj «  malaltaj kastoj », ankaŭ nomitaj Dalit aŭ Senkastuloj. La socio ignoras, stigmatizas, eĉ perfortas tiujn personojn,   situantajn je  subteretaĝoj de socia skalo. «  *Homoj ne volas, ke oni parolu al ili, ke oni tuŝu ilin* », priskribas Madan Pandit, kolektanto de pordo al pordo. Nur eta minoritato estas dungita de urbodomoj kaj  tiamaniere disponas  pri iaj rajtoj, salajro kaj ekipaĵoj. *« ĉiuj aliaj estas ne formalaj laboristoj kaj ekstreme malsolidaj  disponantaj* nenian asekuron kaj nek enspezon », bedaŭras Abdul Saboor Khan,  ĝenerala kunordiganto de Kuracistoj de la Mondo en Nepalo.
Se la danĝeroj estas multnombraj – tranĉvundoj, infektaĵoj, bruldifektoj, toksiĝoj, submeto al tetano kaj al transdoneblaj malsanoj, ostaj kaj muskolaj traŭmatismoj – la aliro al flegoj estas tre malgrandigita. *Nepalo disponas asekuron por malsanoj sufiĉe efektivan  por kovri bezonojn  pri baza sano de* la *popolo*, klarigas Abdul Saboor, *sed ĝi estas  finance ne atingebla por la plimulto de tiuj neformalaj kolektantoj*. » Pli granda obstaklo,  plifortigita pro manko de akompanado adaptita al iliaj problemaroj, eĉ al iom da preterlasemo de la flegantoj por prizorgi ilin.

# Nova modelo por la sano

Kiam en 2015, la nepala ŝtato establas la koncepton U H P C, nova modelo de proksimaj sanitaraj centroj povantaj akcepti la plej malriĉulojn kaj malobstrukci la sep ŝtatajn hospitalojn, Kuracistoj de la Mondo vidas en tiu modelo realan oportunecon de inkluziveco en sano. Sed pro manko de volo aŭ de rimedoj, jaroj pasis kaj nenio estis farita. En 2019, la asocio konsekvence decidas krei la unuan U H P C en Katmanduo. *« La ideo estis pruvi la efikecon kaj ĝustecon de tiu tipo de strukturo kaj liveri ĝian metodologion al la ŝtato por disiĝo en la lando, rememoras Abdul Saboor. Sed, ni petis kondiĉon : la inkluziveco, en tiuj centroj de propono pri sano adaptita al la specifaj bezonoj de la kolektantoj de rubaĵoj. »*

Hodiaŭ, se tiu centro kovras la bezonojn de 15000 kvartalaj loĝantoj, ĝi ĉefe iĝis necesega por la neformalaj kolektantoj, kiuj estas ĉi tie prizorgataj kaj flegataj senpage. Propono personigita, pri kiu ĝojas Aastha Lamichhane, flegistino de U H P C : « *Ili konas la tujajn riskojn de sia laboro sed multe malpli la konsekvencojn pli nerektaj kaj ili estas tiom okupataj por transvivi, ke oni observas multe da malfruo ĉe la zorgoj, pligraviganta liajn problemojn. Do ni elturniĝas por esti proaktivaj en ilia prizorgo, kun ekzemple la sistema kaj senpaga vakcinado de adoltoj kontraŭ difterio kaj tetano ». Konstanta* seninterrompa ligilo estas konservata dank'al la lokaj asocioj de rubaĵkolektantoj, kiel Sasaja, kun kiu Kuracistoj de la Mondo organizas interesegajn aktivaĵojn surloke.

Hodiaŭ la sperto estas vera sukceso : la urbo Katmanduo rekuperis la administradon de la sanitara centro – U H P C kaj konvinkita de ĝia ĝusteco, nun laboras por ĝia reproduktado en 32 ĉefurbaj kvartaloj. *« Ni daŭrigas subtenon al disiĝo de tiuj U H P C, kun rekta apogo al kvin el iuj kaj krome subtenas aliajn sanitarajn, paramedicinajn centrojn en Katmanduo kaj Nepalganj, ĉiam por proksimigi al la flegoj la rubaĵkolektantojn kaj ĉiujn marĝenajn publikojn »*, klarigas Abdul Saboor Khan.

# Batalo por la rajtoj

En Nepalganj, landlima urbo de Hindio, kie kuracistoj de la mondo subtenis la malfermon de alia U H P C , estas la kasto Balmiki ,kiu plenumas ekde pli da kvin cent jaroj la mastrumadon de la urbaj rubaĵoj. *« Origine, ni ne estis rajtigitaj por okupi alian laboron. Hodiaŭ, ni ankoraŭ ne povas manĝi aŭ iri al la templo kun personoj de aliaj kastoj »*, klarigas unu el siaj membroj, Jagdish Balmiki. Fronte al tiu ankrita publika senkompata kondamno, Kuracistoj de la Mondo, diligentas por subteni la kapablecon de tiuj komunumoj organiziĝi por reklamacii pri siaj rajtoj dum longa daŭro. «*Ekde kiam ni kunigas niajn voĉojn, oni sentas sin pli respektataj kaj tio multe helpas la traktadojn por la pliboniĝo de niaj laboraj kondiĉoj* », ĝojis Jagdish Balmiki. En Katmanduo estas la organizo Sofai Yoddha, kiu do naskiĝis por subteni la juran kaŭzon de la nepalaj reciklantoj ĝis la internaciaj kulminoj.

Por Abdul Saboor Khan, labori mane en mane kun la koncernitaj personoj portas esperon. « La sanitara nepala sistemo estas daŭre evoluanta. Restas defioj sed ni akceptos ilin. »

Lou Maraval

# ATESTO



Tarka Bahadur Thapa, respondeculo de programo en Nepalganj

« En Nepalganj, kie uzado de pesticidoj estas oftega, la legomistoj estas ankaŭ minacataj de sia laboro. Spiraj kaj dermatologiaj problemoj, tetano kaj difterio, ostaj kaj muskolaj problemoj…Ni miris pri ilia okulfrapa manko de aliro al prizorgoj, iliaj enspezoj estas ne sufiĉaj por aniĝi al sanitara asekuro.

Tiamaniere ni disvolvis plurfakan respondon pri sano kun nia loka partnero Bee Group. Komence per disdonado de protektaj ekipaĵoj kaj per atentigo al agmaniero por redukti la riskojn ligitajn al uzado de tiuj produktoj. Poste, ni akompanas la transiron de tiuj legomistoj al la ekologia agrikulturo. Finfine, ni subtenas tri sanitarajn centrojn por adaptita kaj senpaga prizorgo, pagante interalie vakcinadon kaj aniĝon al sociala asekuro.

Hodiaŭ, granda parto el akompanataj gelegomistoj turniĝis al la ekologia agrikulturo. Agante por ilia sano, estas tiu de ĉiuj loĝantoj de Nepalganj, kiun ni konservas. »

*Tiun dokumenton el « Pulsation magazine n-ro 157 esperantigis Jeannine Layseman.*